

Jarraporto de la TEJO-  
estraro kaj -komisiitoj,  
jaro 2014/2015



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo  
Nieuwe Binnenweg 176  
3015 BJ, Roterdamo, Nederlando

Kompilita de Tomasz Szymula  
Krakovo, la 30-an de septembro 2015

## Enhavlisto:

[Enkonduko](#)

[Administrado](#)

[Financoj](#)

[Volontulo](#)

[Subvencipetado](#)

[Kongresoj](#)

[IJK 2014 en Fortalezo](#)

[IJK 2015 en Wiesbaden](#)

[IJK 2016 en Vroclavo](#)

[Afrika IJK](#)

[Eksteraj Rilatoj](#)

[Landa Agado](#)

[Edukado](#)

[Kulturo](#)

[Aktivula Trejnado](#)

[Pasporta Servo](#)

[Adoleska Agado](#)

[Scienca kaj Faka Agado](#)

[Homaj Rimedoj](#)

[Informado](#)

[tejo.org](#)

[Kontakto](#)

[TEJO tutmonde](#)

[TEJO-aktuale](#)

## Enkonduko

### Raportas Łukasz Żebrowski, Prezidanto

Karaj legantoj, jen mi havas plezuron prezenti al vi la jaran raporton de TEJO pri la periodo 2014/2015. Kvankam ni sukcesis atingi sufiĉe multajn aferojn, unu el ili mi ŝatus menciigi aparte, ĉar kvankam eble tio ne tuje videblas, ĝi ankoraŭ longe pozitive influos la organizon. Temas pri la trijara strategia plano de TEJO, aŭ pli precize, pri signifa **ŝanĝo en la planado de agado en TEJO**. Sufiĉas enrigardi laborplanojn, kiujn nia organizo havis ankoraŭ antaŭ kelkaj jaroj - temis pri kurtaj kaj skizaj dokumentoj kun tre ĝeneralaj ideoj. Poste ili progresis al jam multe pli detalaj, tamen daŭre unujaraj planoj. Nun, ni sukcesis rigardi nian agadon en pli vasta horizonto kaj pripensi kian TEJO-n ni ŝatus havi ene de tri jaroj. Mi esperas, ke tia serioza kaj vasthorizonta planado iĝos kutimo en TEJO kaj helpos pripensite evolugi agadon de la Organizo.

Tamen ja la jarraporto temas unuavice pri la aferoj okazintaj, do mi revenu al tio kio okazis en la lasta jaro. Certe gravegas pluraj **sukcesoj en subvencipetado**. Danke al tiukampa laboro en la lasta jaro, TEJO ricevos por diversaj celoj (administrado, trejnado de trejnistoj, volontuloj, Afrika-Eŭropa kunlaboro) pli ol cent mil eŭrojn, kio helpos ne nur al nia buĝeto, sed ĉefe al tio, ke ni povos realigi aferojn alikaze tre malfacilajn. En la kongresa kampo rimarkindas **serioza progreso pri Afrika IJK** - ankoraŭ neniam realigo de ĉi tiu projekto estis tiom vere realisma kiel estas nun. Al tio, kaj ne nur al tio grave kontribuis **sukcesoj en eksteraj rilatoj**, do interalie ĉeesto de TEJO en gvidantaro de IKRJO kaj elektiĝoj al gravaj organoj de Forumo Junulara Eŭropa. Certe eblas rimarki **progreson en landa agado** – temas ekzemple pri kelkaj novaj Landaj Sekcioj kaj intesigo de kunlaboro en regionoj. Tre aktivis novaj kaj ankaŭ pli frue kreitaj **retaj trejnadoj**, ne forgesante kompreneble ankaŭ pri okazigado de **ĉeestaj seminarioj** aŭ kontribuado al ili. Rimarkindas **funkciigo de du novaj komisionoj**: pri adoleska agado kaj pri homaj rimedoj. Rilate al Pasporta Servo raporteblas sukceso pri lanĉo de nova retpaĝo, sed bedaŭrinde ankaŭ malsukceso pro daŭra neapero de papera eldono. Fine, nepre menciindas tre videbla afero – lanĉo de modernaspekta kaj enhavoriĉa **nova tejo.org** pri kiu ni finfine povas vere fieri.

Pri ĉio ĉi pli detale, kaj ankaŭ pri aliaj aferoj realigitaj en pasinta jaro vi povas legi en ĉi tiu raporto. Mi ŝatus ankaŭ kore danki al ĉiuj, kiuj kontribuis al la laboro en TEJO!

## Administrado

### Raportas Tomasz Szymula, Ĝenerala Sekretario

#### Cirkulero

#### 1. Trello

Ekde februaro mi proponis al la komitato kontribui al la cirkulero per Trello. La detalojn mi priskribis en la mesaĝo al la komitata retlisto kun titolo “februara cirkulero” de la 29-a de januaro. Tio montriĝis sukceso. Multaj komitatanoj dum la sekvaj monatoj volontule pretis eksperimenti kaj lerni la novan ilon. Nun membras tie 29 komitatanoj.

#### 2. Aŭtomato

La plej granda projekto kiun mi sukcese finis estas aŭtomatigo de kunmetado de kontribuoj en finan dosieron.

### 3. Enketo

Aprile mi kreis demandaron por ke la komitato povu sinesprimi kaj kundividi siajn pensojn. Konkludoj ne estas revoluciigaj.

### 4. Reguleco kaj kvanto de kontribuoj

Mankis reguleco en alvokoj/limdatoj.

### 5. Rekomendoj:

- a. daŭrigi per trello
- b. regulaj fiksita limdato komence de la monato (ekz. la 3-a)
- c. eksperimenti pri tio, kiel legigi kaj diskutigi aktivulojn pri la enhavo
- d. persone instigi kontribui

## **Datumbazo**

Transprenante la postenon pro malfunkcio de la vikio ne ekzistis oficiala listo de komitatanoj. Estis kreita kvazaŭ datumbaza gugla kalkultabelo. El ĝi ĉerpas datumojn cirkulerilo kaj aliaj aŭtomatigoj eblas.

## **Voĉdonoj**

Ĉiam la problemo estis kvorumo. Fine de la voĉdona periodo estraranoj estis devigitaj persone peti komitatanojn voĉdoni – alikaze verŝajne plimulto da balotoj fiaskus pro manko de kvorumo. Kutime sen memorigoj voĉdonis ~20% rajtanoj.

## **Manlibro**

Ĉiun ĝeneralan demandon kun ricevita respondo mi strebis enmeti en la gugla dokumento. Nun ĝi konsistas de 5 paĝoj da krudaj informoj pri TEJO.

## **Nomumo de nova komitatano A**

Antaŭe ĝenerala sekretario devis memori en kiuj lokoj/dokumentoj/alirebloj bezonatas ŝanĝoj. Nun oni kopias ŝablonan trello-karton kiu enhavas pretajn taskolistojn.

## **Trello por estraro**

Ekuzo de trello en la estraro estas nur duonsukceso. Tri estraranoj efike ĝin uzis, aliaj esceptokaze. Mia rekomendo estas, ke sekva ĝensek strikte zorgu, ke ĉiuj adaptiĝu ekde komenco.

## **Trello por volontulo**

Volontulo tre bone kaj efike kunlaboris per trello kun la estraro. Tamen mankis regula raportado pri aferoj, kiuj ne koncernis rekte aliajn personojn. Efektive en kelkaj okazoj la estraro ne estis sufiĉe bone informita pri stato de taskoj.

## **Trello por komisionoj**

La ideo, kiun mi strebis realigi estas, ke krom la dissenlistoj komisionoj kunlaboru per publika trello-tabulo. Celo estas informadi pri tio, kio okazas kaj doni eblecon aktiviĝi. Esceptaj estas Komisiono pri Homaj Rimedoj kaj Eksteraj rilatoj, ĉar ambaŭ kampoj postulas privatecon por efike labori. Tial oni povas konkludi, ke:

- Komisionoj pri Adoleksa Agado, Eksteraj Rilatoj kaj Homaj Rimedoj estis plene sukcesa en tiu punkto
- Komisiono pri Aktivula Trejnado ekde longe sukcese kaj efike laboras per Trello – tamen bezonas tempo por adaptiĝi al plenpublika maniero,
- Komisiono pri Scienca kaj Faka Agado sukcese adaptis trellon sed ne daŭrigis

## **Trello por revuoj**

Massimo Ripani, la redaktoro de tejo-tutmonde sukcese uzas por organizi sian laboron.

## **Kondomoj**

Post la komitata decido pri kondomoj mi kreis [trello tabulon](#) por la projekto kaj alvokis por trovi gvidanton de la projekto. Neniu sinproponis.

## **Financoj**

Detaloj pri financoj troviĝas en aparta financa raporto.

## **Volontulo**

### **Raportas Paweł Fischer-Kotowski, la volontulo de TEJO**

La 29-an de aŭgusto 2014 finiĝis la unujara deĵoro de la TEJO-volontulo Rogier Huurman (Nederlando). La 8-an de septembro 2014 anstataŭis lin Mounir Abjiou (Maroko), sed pro vizaj limigoj tiu volontulado povis daŭri nur ĝis la 24-a de oktobro 2014. Ekde la 5-a de novembro 2014 la plentempa volontulo estas Paweł Fischer-Kotowski (Pollando). Ekde la 18-a de februaro 2015 li okupas tiun postenon kadre de la programo de Eŭropa Volontula Servo.

La volontulo de TEJO laboras en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Inter liaj taskoj estas ĉiutaga traktado de poŝto kaj retroŝto adresita al TEJO, kontribuado al la sociaj retejoj pri la aktivadoj de la organizaĵo (Facebook, Twitter), provlegado de “TEJO-aktuale”, teknika kaj organiza helpo en la pretigo kaj dissendo de “Kontakto”, voĉlegado de artikoloj el “Esperanto” por vidhandikapitoj k.a. Aldone, li plenumas aliajn taskojn en la interkonsento kun la Estraro kaj Ĝenerala Direktoro.

La volontulo reprezentis organizaĵon en Junulara E-Semajno en Weißwasser (Germanio), Universala Kongreso de Esperanto en Lille (Francio) kaj Internacia Junulara Kongreso en Wiesbaden (Germanio). Aldone, la 6-an de majo 2015 la estrarano pri eksteraj rilatoj, Veronika Poór, kaj la volontulo starigis la TEJO-budon en Bruselo kadre de YO!Fest.

La deĵoro de la nuna volontulo finiĝos la 17-an de decembro 2015. TEJO ricevis subvencion de EVS kadre de kiu ekde januaro 2016 ĝi havos samtempe du volontulojn: Jérémie Bert (Francio) kaj Michal Matúšov (Slovakio).

## **Subvencipetado**

### **Raportas Łukasz Żebrowski, Prezidanto**

Lasta jaro abundis je bonaj informoj pri subvencipetoj de TEJO. Ĝi komenciĝis per ricevo de 7 575 eŭroj por realigi projekton kadre de Eŭropa Volontula Servo. Tio permesis al ni iom senŝarĝigi la buĝeton de TEJO, de kiu ĝis tiam venis la rimedoj por kovri la kostojn de nemalhavebla volontulo en la Centra Oficejo. Kadre de tiu projekto en Roterdamo nun volontulas Paweł Fischer-Kotowski kaj la projekton mem ĉefverkis tiama oficisto de TEJO, Manuela Ronco.

Fine de 2014 ni eksciis pri ricevo de nia plej granda subvencio, por krei programon pri preparado de trejnistoj: 58 845 eŭroj kadre de Erasmus+. La projekto estis verkita de la firmao Kosmo Strategio. Ĝia unua renkontiĝo okazos en la IJK 2015 en Wiesbaden.

Subvencion ni ricevis ankaŭ kadre de la programo Seed Funding de la Norda-Suda Centro de la Eŭropa Konsilio. Temas pri 2 500 eŭroj por venigi du afrikajn aktivulojn al IJK 2015 en

Wiesbaden por interŝanĝi spertojn kun alilandaj aktivuloj. Bedaŭrinde nun ni jam scias, ke ili ne ricevis vizojn, do necesos pridemandi la subvencionanton ĉu la projekto modifeblas por iu alia evento aŭ ni devas redoni la subvencion. La projekton kunkreis (alfabetorde): Sharifa Abas, Paulinka Kožuchová, Michael Boris Mandirola, Veronika Poór, Manuela Ronco, Mlossi Saidi, Tomasz Szymula kaj Łukasz Żebrowski.

Sekvas la administra subvencio, pinte grava por la buĝeto de TEJO, kiu signife kovras diversajn kutimajn, administrajn elspezojn, kiuj sen la subvencio devus esti kovritaj rekte de la buĝeto de TEJO. La 19 499 eŭroj ricevitaj por la jaro 2015 ludas tre gravan rolon. Ĉi tiun projekton ĉefverkis Veronika Poór.

Havinte jam sukceson pri unupersona EVS-projekto ni provis subvencipeti por du. La projekto ĉefverkita de Costanza Schönfeld ankaŭ sukcesis kaj danke al la ricevitaj 18 167,32 eŭroj en 2016 en Centra Oficejo oficos du volontuloj.

## Kongresoj

### IJK 2014 en Fortalezo

#### **Raportas Tina Tiŝljar, respondeca estrarano**

IJK 2014 okazis en Fortalezo en la norda Brazilo. La organiza teamo konsistis el pluraj junuloj el pluraj partoj de Brazilo kaj ĉefa problemo estis, ke nur kelkaj el ili estis lokaj esperantistoj. La kongreso komencĝis la 18-an de Julio kaj antaŭ ĝi okazis antaŭkongresa ekskurso.

La kongreson partoprenis 150 homoj. La kongresejo estis tre taŭga. Dumtage okazis pluraj programeroj. Interalie okazis Komitatkunsido de TEJO kadre de kiu fondiĝis Amerika Komisiono de TEJO. La Kultur-Lingva Festivalo okazis en parko/placo en la urbo, kie oni instalas etajn tendojn. Vizitis ĝin pluraj lokanoj kaj ĵurnalistoj. La eksteraj rilatoj de la kongreso estis tre bonaj.

La vespera programo estis abunda kaj kun pluraj diversaj artistoj kaj estis ĝenerale bonege akceptita. Kreiĝis ankaŭ filmo pri ĉiuj koncertoj de la IJK:

<https://www.youtube.com/watch?v=RVI6doVIIgo>

La kongreso finiĝis la 25-an de julio kaj kelkek junuloj ĝuis la postkongresan ekskurson.

### IJK 2015 en Wiesbaden

#### **Raportas Tina Tiŝljar, respondeca estrarano**

La 71-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 2015 en Wiesbaden, Germanio kaj estis organizita de du Landaj Sekcioj de TEJO: la germana kaj la itala. La teamo estis nemalgranda, tamen malstabla estis la pozicio de la kunordiganto. Feliĉe, danke al la tuta teamo, tiuj ŝanĝoj ne efikis aparte malbone al organizado de la kongreso ĝenerale.

Al la IJK aliĝis al ĝi proksimume 300 homoj. La temo estis tutmonda justeco. La programo sufiĉe abundis, aparte la vespera. Dum la kongreso okazis interalie Komitatkunsido de TEJO

kaj AMO-Seminario "Fotu mojose". La kongresejo estis tre bona - ĉio okazis en unu komforta loko. Kion la partoprenantoj plej ŝatis? Tion vi povas ekscii de ĉi tiu video: [https://youtu.be/H\\_OYn6PZKpw](https://youtu.be/H_OYn6PZKpw)

## **IJK 2016 en Vroclavo**

### **Raportas Łukasz Żebrowski, respondeca estrarano**

La organizado de IJK 2016 en Vroclavo ĝis nun iras tute bone. La kerna teamo fortas, tamen ankoraŭ estas kelkaj mankoj. La kongresejo estas trovita, tamen ĝi ne estas tute perfekta. Ne eblas ĉion organizi tute samloke, sed la distancoj ne estos grandaj. La buĝeto estas preskaŭ preta, neforas ankaŭ kotiztabelo. La temo de la kongreso estos #aktivado kaj ĝenerale la programo estos ligita al aktivado ĉefe en la reta mondo. Antaŭ kelka tempo elektita estis la emblemo de la kongreso. Ĉe <http://ijk2016.tejo.org/> aperis jam la retpaĝo (pli frue estis tie nur komenca anaonco).

## **Afrika IJK**

### **Raportas Łukasz Żebrowski, respondeca estrarano**

En ĉi tiu jaro finfine ni atingis la punkton en kiu okazigo de IJK en Afriko estas jam vere realisma afero kaj tute ebla en 2017. Konstante ni estas en kontakto kun ILEI pri la projekto, ĉar la ideo estas okazigi IJK-n kaj ILEI-Konferencon unu post la alia en neforaj lokoj. Ĉefa kandidato por organizi IJK-n estas Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO), kiu proponas organizi la kongreson en Buĵumburo, ĉefurbo de Burundo.

Gravega punkto en la preparoj estis do vizito en Kenjo kaj en Burundo januare/februare 2015. En Kenjo okazis Afrika-Eŭropa Trejnado por Junularaj Organizoj financita de la Norda-Suda Centro de la Konsilio de Eŭropo. Ĉi tiu trejnado, krom evidente riĉigi la konojn pri Afrika-Eŭropa kunlaboro, ebligis sekvantan ĝin vojaĝon al Burundo. Krome mi renkontiĝis kun Sharifa Abas en Kenjo por priparoli evoluigon de junulara E-movado tie kaj starigon de Landa Sekcio. En Burundo mi havis okazon viziti la plej veŝajnajn IJK-ejon, viziti Esperanto-centron en Rumonge kaj transdoni la komputilon kaj ekranon aĉetitajn danke al monkolleto kaj renkontiĝi kun lokaj esperantistoj kaj lernantoj de Esperanto en Buĵumburo, Rumonge, Gasanda kaj Ngozi. La ĉefa konkludo de ĉi tiu vizito estas, ke en Burundo estas ambaŭ necesa infrastrukturo por okazigi IJK-n kaj sufiĉe multaj entuziazmaj junuloj por organizi ĝin. De tiuj vizitoj mi preparis detalan internan raporton kaj ankaŭ artikolon legeblan en numero 266 (2015:2) de Kontakto.

Sekvante la rezultojn de la vizito en Afriko ni preparis du subvencipetajn projektojn. Unua, kadre de Seed Funding de la Norda-Suda Centro de la Konsilio de Eŭropo celis venigi Mlossi Saidi el Burundo kaj Sharifa Abas el Kenjo al IJK en Wiesbaden. La projekto estis akceptita, sed bedaŭrinde nek Mlossi nek Sharifa ricevis vizojn. La dua projekto, kadre de Erasmus+, estas pli longdaŭra kaj grandskala. Ĝi konsistos el 4 renkontiĝoj: dum IJK-j 2016 en Vroclavo, espereble dum 2017 en Burundo kaj aldone ankoraŭ po 1 en Afriko kaj Eŭropo. Bedaŭrinde ne sufiĉis tempo por taŭgakvalite finpretigi ĝin por la aprila limdato, do ĝi estos finfarita por la limdato en la komenco de septembro.

Pri la IJK mem – verŝajne ĝis la fino de oktobro devus eblu alpreni sufiĉe firman decidon pri okazigo de IJK 2017 en Buĵumburo, post kiam ni jam certas pri stabileco de la lando post la

prezidentaj elektoj. Kompreneble ĉio ĉi ne signifas, ke la vojo al IJK en Afriko estos facila – antaŭ TEJO estas ankoraŭ grandega, plurkampa laboro. Krom trejnado de organizantoj temas ĉefe pri landa agado kaj eksteraj rilatoj en Afriko, subvencipetado kaj subtenserĉado por la kongreso. Ĉi tiu laboro multas, sed nepre farendas por ke la IJK en Afriko ne nur okazu, sed por ke ĝi estu reala sukceso – multe paroprenata de Afrikaj junuloj kernpunkto de bone farita laboro en kaj por Afriko.

## Eksteraj Rilatoj

### **Raportas Veronika Poór, respondeca estrarano**

En la kampo de Eksteraj Rilatoj estas brilaj novaĵoj. Pli ol 10 novuloj ekaktivis en la komisiono, kaj la prestiĝo de TEJO konstante plialtiĝas en la mondo de junularaj organizoj.

Reprezentanto de TEJO estis elektita de la organizoj de la Forumo Junulara-Eŭropa al la Konsila Konsilio pri Junularo de la Konsilio de Eŭropo. Aktivulo de TEJO estas en la organo de la Forumo Junulara-Eŭropa kaj TEJO estas en la gvidantaro de IKRJO, organizaro de junuloj, kiu estas la voĉo de junularaj organizoj akceptata de UN.

La laboro pri Eksteraj Rilatoj pliintensiĝas ankaŭ en Latin-Ameriko, Azio kaj Afriko. Plurfoje estis TEJO-reprezentantoj elektitaj por altnivelaj reprezentadoj de junularaj organizaroj, kiujn TEJO membras. TEJO estas nun konsiderata en Eŭropo kaj en la mondo kiel tre prestiĝa kaj influa junulara organizo.

Ĉar la detala raporto longus plurajn paĝojn, la detalojn legu en la cirkuleroj de TEJO.

<http://tejo.org/dokumentoj-kategorio/cirkuleroj/>

## Landa Agado

### **Raportas Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano**

La plej pozitiva afero estas ke TEJO ekhavis novajn landajn sekciojn: en 2015 estis akceptitaj KolombEJO (Kolombia Esperanta Junulara Organizo) kaj BOJE (Benina Organizo de Junaj Esperantistoj), estas krome kontakto kun la junularaj organizoj en Pakistano, Filipinoj, Ĉilio kaj Nikaragvo kaj kun gejunuloj en diversaj aliaj landoj kaj ni esperu, ke baldaŭ tiuj organizoj iĝos landaj sekcioj de TEJO.

Pri la nunaj landaj sekcioj de TEJO, menciindas la kunlaboro kun revekigantaj organizoj; mi aparte ĝojas je la kresko kaj restariĝo de DEJO kaj SKEJ, esperante ke la saman vojon sekvu diversaj aliaj organizoj.

Tamen aliflanke la plano starigi landagadajn komisionojn estis nur ekrealigita en Ameriko, Azio kaj Eŭropo. En Azio jam estis kreita retlisto kun nomumitaj reprezentantoj de plejparto de la landaj sekcioj kaj de kelkaj landoj. Pri Ameriko estis interskribado de pluraj aktivuloj kaj kunsido dum la lastaj du IJK-j, dum Eŭropa komisiono kunsidis dum JES, IJF kaj IJK. Pro diversaj kialoj neniu el ili estas jam memstara kaj certe restas ankoraŭ multe da laboro por porti ilin al plena funkciado kaj por malfermi tion al la ceteraj mondopartoj.

Pri projektoj inter niaj landaj sekcioj, pludaŭras la kunlaboro pri kunordigo de la datoj de la someraj aranĝoj kaj krome ekde ĉi tiu jaro estas nova partnera projekto kadre de Erasmus+ pri Trejnado de Trejnistoj en kiu estas engaĝitaj 5 LS-j de TEJO. Krome menciindas kelkaj



renkontiĝoj kiuj estas kunorganizataj de niaj landaj sekcioj partnere aŭ laŭvice kiel JES, KS, ĈAR kaj IR.

Eĉ se mi ne plene kontentas je la atingitaj rezultoj, mi kredas, ke estis faritaj signifaj paŝoj antaŭen en la landa agado de TEJO, aparte je regiona nivelo kaj ke tio estos bona fundamento por la onta agado.

## Edukado

**Ne raportis Michael Boris Mandirola, respondeca estrarano**

## Kulturo

**Ne raportis Alexandre Raymond, respondeca estrarano**

## Aktivula Trejnado

**Raportas Veronika Poór, respondeca estrarano**

La 10-an de julio 2014 mi transdonis la gvidadon de la komisiono pri aktivula trejnado al Sara Spanò. Mi tre ĝojas pro ŝia laboro kaj gratulas pro la atingoj tiukampe.

**Raportas Sara Spanó, komisiito**

La agadkampo Aktivula Trejnado havis tre plenan kaj intensan jaron, riĉan je pozitivaj atingoj.

Pri rettrejnadaj, la Komisiono lanĉis rettrejnadon pri grupformado kaj teamlaboro (1-an de septembro 2014) kaj pri subvencipetado (1-an de junio 2015). La rettrejnadaj pri intertraktado, pri kiel esti efikaj komitatanoj A kaj B kaj pri Eksteraj Rilatoj, daŭre estis aktivaj. La rettrejnado pri Eksteraj Rilatoj estis reorganizita kaj relanĉita. Krome, estis iniciatita reta trejnado pri informado sekve de ĉeesta trejnado por grupo de volontuloj kaj helpantoj, kiuj deĵoros (aŭgusto/septembro 2015) ĉe la Dujara Libroforo de Rio-de-Ĵanejro.

Tiu ĉi lasta mencio pri miksita reta/ĉeesta trejnado en Brazilo kondukas la raporton al la vasta ĉapitro de ĉeestaj trejnadaj en kiuj AT-komisionanoj gvidis aŭ kungvidis seminariojn.

Rimarkindas en tiu ĉi parto la pli kaj pli intensa kunlaborado kun UEA kaj la programo pri AMO-seminarioj, la akiro de EU-subvencioj por kunfinanci la agadon kaj la kunlaborado kun la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, kiu signifas antaŭenpuŝis la engaĝon de neesperantistaj trejnistoj en niajn trejnseminariojn.

La Komisiono kontribuis al trejnado dum la EEU-kongreso en Kroatio (julio 2014); ĝi gvidis AMO-seminaron dum IJK en Brazilo (aŭgusto 2014), kie ĝi enkondukis la transdonon de atestiloj al trejnistoj kaj gvidintoj; ĝi kungvidis trejnadon dum IJS (aŭgusto 2014); ĝi kungvidis AMO-seminaron dum la Itala Kongreso (aŭgusto 2014); dum la organizado de la 3a Junulara Somera Komuna Aranĝo (JuSKA, Kubo, oktobro 2014) ĝi okazigis trejnadsesion pri organizado de junularaj eventoj; ĝi gvidis kaj kunorganizis trejnseksiojn kadre de AMO-seminario dum JES en Germanio (decembro 2014/januario 2015); ĝi gvidis AMO-seminaron dum la Brazila kongreso (januario 2015); ĝi kungvidis trejnseminaron –

okazintan dum renkontiĝo en Italio (marto 2015) kadre de Grundtvig-partnerado fokusita pri loka agado – kunlabore kun juna profesia neesperantista trejnistino (Elisa Vola el Italio); ĝi kungvidis AMO-seminaron – okazintan dum IJF (aprilo 2015) kadre de Grundtvig-partnerado fokusita je junularaj organizoj – kunlabore kun juna profesia neesperantista trejnistino, tre aktiva en junulara medio (Eliza Popper el Hungario); ĝi gvidis AMO-seminaron (aŭgusto 2015) dum la IJK en Germanio.

Dum IJK en Germanio (aŭgusto 2015) okazis la unua renkontiĝo de Eŭropa partnera projekto kunordigata de TEJO kadre de Erasmus+ pri Trejnado de Trejnistoj: dum la venontaj monatoj, ĝi plispertigos junajn volontulajn trejnistojn el Pollando, Germanio, Italio, Kataluna Landaro kaj Danio, por plifaciligi kaj pliprofesiigi la transdonon de konoj kaj kapabloj.

## Pasporta Servo

**Ne raportis Alexandre Raymond, respondeca estrarano**

## Adoleska Agado

**Raportas Tomasz Szymula, respondeca estrarano**

Mi kreis por la komisiono publikan trello-tabulon kaj petis la komisiiton akcepti ĝin kaj organizi la laboron en ĝi. Krom tio Tobiasz gvidis la laboron memstare.

**Raportas Tobiasz Kubisiowski, komisiito**

La Komisiono pri Adoleska Agado reaktiviĝis sub mia gvido en la Junulara E-Semajno 2014/15 (Weißwasser, Germanio). Kune kun kelkaj partoprenantaj adoleskuloj mi kunsidis kaj diskutis pri tio, kio karakterizas tiun ĉi aĝgrupon kaj kial ĝiaj anoj ne tiom abunde partoprenas junularajn Esperanto-aranĝojn. La ĉefa konkludo de la kunsido estis, ke la organizantoj devas zorgi pri speciala programo por adoleskuloj kaj pere de ĝi varbi ilin antaŭ la aranĝo. Laŭ tiu ĉi konkludo mi komencis labori pri tia ĉi programo en la sekva JES (en Eger, Hungario), en kies organiza teamo mi anas. Realigo de adoleska programo kadre de JES (kaj poste en la 72-a IJK) estas nuntempe la ĉefa celo de la Komisiono.

## Scienca kaj Faka Agado

**Raportas Veronika Poór, respondeca estrarano**

Dum la 70-a IJK mi transdonis la gvidadon de la komisiono pri Scienca kaj Faka Agado al Nick Woods, kiu transdonis la respondecon al Nelly Darbois en februaro 2015. Sub ambaŭ komisiitoj daŭriĝis la organizado de Sciencfakaj prelegsesioj, kaj ankaŭ la pluumo de pluraj kunlaboroj. Mi gratulas ambaŭ komisiitojn, ĉar ne facilas transpreni komisionon jam funkciantan.

## Homaj Rimedoj

**Raportas Veronika Poór, respondeca estrarano**

En la kampo de Homaj Rimedoj komence de la raportperiodo kreiĝis komisiono.

Inter la agadoj de la komisiono estas:

- verkado de artikolo al TEJO-Tutmonde kaj varbado por Fonduso Trampolino (<http://tejo.org/agado/fonduso-trampolino/>)
- konsilado al aktivuloj kiel aktivaj, kaj kunligo de aktivemuloj kun la respondeculoj
- helpado rilate al diversaj TEJO-paĝoj
- verkado de gvidlinioj pri kiel delegi taskojn, por organizado de retkunvenoj, por konstrua kritiko
- zorgado pri demandaro por individuaj membroj, zorgado pri novuloj aperantaj en sociaj retejoj
- la kunlaboro cele al la enigo de informoj rilate al TEJO en la Esperanto-kurso en Duolingo
- informado de membroj kaj ĉe [lenu.net](http://lenu.net) pri ebloj aktiviĝi en TEJO

## Informado

### Ne raportis Alexandre Raymond, respondeca estrarano

#### tejo.org

##### Raportas Łukasz Żebrowski, respondeca estrarano

Dum la lasta jaro ni kreis tute novan retpaĝon de TEJO, kiu estas freŝa, aktiva, oranĝa, vigla – simple mojosa. La unuan koncepton de la nova retpaĝo kreis la Estraro de TEJO en sia kunveno en aprilo 2014. Baze de ĝi maje ni kreis alvokon kaj ekserĉis realigantojn. Alvenis tri proponoj el kiuj du estis sufiĉe proksimaj al nia buĝeto. Surbaze de la anoncigitaj kriterioj kiel realiganto de la retpaĝo elektiĝis [Tim Morley](#) kaj nome de la Estraro mi kunordigis la projekton. Samtempe ni ankaŭ trovis alian ŝablonon per kiu ni volis aspektigi nian retejo. Ĝi grave influis al kompleta ŝanĝo de la unua koncepto al retpaĝo pli enhavo-riĉa ol ni planis komence. Tial ankaŭ ĝia kreado daŭris multe pli longe ol atendite. Same, maje ni alvokis ankaŭ al sendado de altkvalitaj fotoj por ke nia retpaĝo estu pli bonaspekta. Tiun alvokon plej multfoje respondis [Pola Esperanto-Junularo](#) publikigante sian [retan fotaron](#). Sume do la laboro por lanĉi la novan retpaĝon en novembro 2014 daŭris kelkajn monatojn (tamen kun paŭzo julie-aŭguste), kun kontribuo de multaj homoj, kiuj aldonis diversajn aferojn: iun enhavon, bildojn, fotojn aŭ eĉ informojn pri si mem.

En la retpaĝo oni povas trovi unuavice, rapidan prezenton de la ebloj [partopreni](#) en TEJO. Due, troveblas niaj [agadoj](#) grupigitaj laŭ la tri strategiaj agadkampoj: [konsciigo](#), [kapabligo](#) kaj [komunumo](#) (estas ankoraŭ kvara kampo – kunordigo – sed ĝi ja estas iom alispeca kaj tial ne prezentiĝas en tiu parto de la retejo). Trie, alvenas informoj pri TEJO kiel [organizo](#). En tiu parto troveblas ĉio pri nia [strukturo](#). Eblas eniri ankaŭ pli detale kaj ekscii pri niaj [Komitato](#), [Estrarano](#), [Komisionoj kaj Komisiitoj](#), [Oficejo](#), [Landaj](#) kaj [Fakaj](#) Sekcioj. Se vi ŝatus ekkoni niajn [aktivulojn](#) pli bone, iru al tiu parto de la retejo kaj klaku bildon de elektita [estrarano](#), [komitatano](#), [komisiito](#) aŭ [oficejano](#). En tiu sekcio troveblas ankaŭ [dokumentoj](#) de TEJO – tiuj plej gravaj, kiel la [Regularo kaj reglamentoj](#), [strategioj kaj laborplanoj](#) aŭ [jarraportoj](#), sed ankaŭ niaj ĉiu-monataj komitataj [cirkuleroj](#) kaj novaĵletero [TEJO-aktuale](#). Finas ĉi tiun sekcion informoj pri la [partneroj](#) de TEJO kaj, kompreneble, la [kontaktoinformoj](#). La parton pri la organizo sekvas [eventoj](#) kaj fine [novaĵoj](#).

En 2015 kiam la enhavo de la retpaĝo jam sufiĉe stabilis ni komencis ĝian tradukadon al aliaj lingvoj. La tradukadon kunordigis Tuška (Konstanze Schönfeld). Nune la retpaĝo tute aŭ preskaŭ tute tradukitas al la angla, la germana, la itala kaj la vjetnama kaj plejparte tradukitas ankaŭ al la hispana, la hungara kaj la pola. Progresitas ankaŭ kelkaj aliaj lingvoversioj.

## **Kontakto**

### **Raportas Rogener Pavinski, redaktoro de *Kontakto***

De la komenco de la jaro 2015 ĝis nun *Kontakto* (kun la oficiala rubriko de TEJO, *TEJO tutmonde*) havis stabilan situacion. Ĝis nun aperis 3 numeroj el 6. Ili aperis kun iom da malfruo, kiu verŝajne estos estingita ĝis la fino de la jaro. Kiel kutime, la numeroj enhavis diverstemajn artikolojn kun emfazo al la ĉefartikoloj *La Supersekundo kaj tempo-mezuriloj* (2015:1), *Akvo – la oro de la tria jarmilo* (2015:2) kaj *Militoj* (2015:3).

Ni tenis la konstantajn rubrikojn (La Blaga Blog, Tiel la Mondo, VV) kaj kreis novan (Kontaktek - pri la novaĵoj el la teknologia mondo). Ankaŭ ni donis spacon al noveloj (*Nubego*, 2015:1). Aliaj interesaj artikoloj pritraktas kinon, sciencan, videoludon, muzikeldonadon k.a. Dum la unuaj 2 numeroj de la jarkolekto la intervjuo rubriko ne aperis, sed ĝi revenis (2015:3) kun la gasto Floreal Martorell. La kunlaborantoj venas el diversaj landoj kaj multaj el ili kunlaboras verkas por la revuo pli ol unufoje.

Ni daŭre proponas temojn por ke la kunlaborantoj prenu verkideon, sed ankaŭ raportas pri aktualaĵoj kiel la raporto pri la tertremo en Nepalo (2015:1) verkita de homo, kiu spertis la okazaĵon kaj pri la terorismo de ISIS en Islamaj landoj (2015:3).

En la reto okazis kreskoj: nia retejo estas konstante aktualigata kaj kreskas la atingo de niaj profiloj en la reto (Facebook-ŝatoj: de 665 (en 2013) al 1132; Twitter-sekvantoj: de 790 (en 2013) al 1005. Kun Varsovia Vento daŭras (kvankam pli malgranda) kunlaboro, en kiu la podkasta programo komentas nian revuon. Detalajn statistikojn pri abonantoj mi ne havas. Tamen laŭ UEA en la Gazetara Komunikado n-ro 574 (2015-03-25) "La revuo *Esperanto* havis 2898 pagitajn abonantojn (-70) kaj la junulara revuo *Kontakto* 690 (+89)".

La 2-an fojon ni organizas la Muzikan Konkurson de Kontakto. Ĉi-jare helpis nin per la kreado kaj prizorgado de la voĉdona sistemo kaj TEJO-komitato Michal Matúšov. Alvenis 14 konkursaĵoj el diversaj stiloj kaj el diversaj landoj. Kelkaj konkursantoj partoprenas la duan fojon per novaj kantoj (La Perdita Generacio, Sepa kaj Asorti, Roberto Pigro kaj SoNori) kaj aliaj konataj muzikistoj partoprenas la unuan fojon (Flávio Fonseca, Ĵomart kaj Natasa kaj Martin Wiese). La rezulto estos anoncita tre baldaŭ.

## **TEJO tutmonde**

### **Ne raportis Massimo Ripani, redaktoro**

## **TEJO-aktuale**

### **Raportas Julia Noe, redaktoro**

TEJO-aktuale estas retpoŝta informilo de TEJO. TEJO-aktuale estas senpage abonebla, aperas 2-semajnrhythme kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj. TEJO-aktuale estas abonebla retpoŝte (<http://www.uea.org/retlistoj>) kaj legebla kaj en sia retpaĝo (<http://www.tejo.org/ta>).

Kontribuoj ĉiam estas bonvena per la retformularo en la retpaĝo aŭ retpoŝte al tejo-aktuale ĉe [tejo.org](http://www.tejo.org).

Okaze de la renovigo de tejo.org la eldonoj de TEJO-aktuale nun aperas en blogo de la nova retejo kaj la origina retpaĝo restas kiel arkivo de la malnovaj eldonoj.

Post 7-jara redaktado mi dum la ĉijara IJK transdonos mian postenon al mia posteulo.

Kelkaj aĵoj, kiuj povus esti plibonigita:

- TA devus esti elektronike arkivita de TEJO, sed mi ĝis nun ne ricevis la informon kie kaj kiel.
- la kontaktilo en la retpaĝo tejo.org/ta sendas al aktuale-red ĉe tejo.org, kiu daŭre estas spamata, ĝi prefere sendu al tejo-aktuale ĉe tejo.org

TEJO-aktuale nun havas 886 retpoŝtajn abonantojn. La numero plialtiĝis je 100 kompare kun la antaŭa jaro.